# Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

25a jarkolekto • n-ro 1 | **januaro-februaro 2020**

LA MONDO REVERDIĜAS

Kun informoj pri la jarkunveno de Esperanto Nederland




5 Multatuli 200

8 Donacrekordo por UEA

12 Printempa vortserĉenigmo

11 Revuo-interŝanĝo

6 ECR en Kassel



# Fenikso

## Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
**ISSN 1384-6515**

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.
La jara kotizo estas € 35,-
(por samdomanoj €12,50).
NEJ-anoj pagas € 15,-
(por samdomanoj € 5,-).

Fenikso estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando.
La tarifo estas € 20,-.

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version de Rob Moerbeek, vidu dekstre.

### Redakcio:

- **Ĉefredaktoro:** Frank van Hertrooij
- **Redaktoro:** Marc Konijnenberg

**redakcio@esperanto-nederland.nl**

### Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la 10a de marto 2020.

**Informoj pri Esperanto:**
Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
(info@esperanto-nederland.nl)
tel.050-5718842

**Studie-weekeinde:**
(studosemajnfino@esperanto-nederland.nl).

## Estraro

- **Estraro:** (estraro@esperanto-nederland.nl)
- **Prezidanto:** Said Mozaffari Baluchi, (prezidanto@esperanto-nederland.nl) tel. 06 84316394
- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen (sekretario@esperanto-nederland.nl)
- **Kasisto:** Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, 2903 AC, Capelle a/d IJssel. (kasisto@esperanto-nederland.nl) tel.010 2133320
- **Estrarano:** (i.a. pri instruadaj aferoj): Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE, Beverwijk. (rob.moerbeek@esperanto-nederland.nl) tel.0251 231079
- **Estrarano:** Andries Hovinga, De Fennen 47, 8918 CC, Leeuwarden, tel.06 28916262 (andries.hovinga@esperanto-nederland.nl)
- Pri sociaj komunikiloj: (sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)
- **Membro-administranto:** Koos Scharroo, Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord. (membroj@esperanto-nederland.nl) tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero


**Bankkonto:**
IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
nome de Esperanto Nederland,
Capelle aan den IJssel.

**Eventueel retouradres:**
Esperanto Nederland Ledenadministratie,
Vaartweg 24G
8382 EB
Frederiksoord

# Enhavo


3 Enhavo
4 Mallongaĵoj
5 Multatuli naskiĝis antaŭ 200 jaroj
6 Jarkunveno 2020
7 Ĉampano Esperanto + Donacrekordo por UEA
8 Waarom lid worden van Esperanto Nederland?
9 Eŭropa Civitana Renkonto en Kassel
10 Revuo-interŝanĝo
11 Vortserĉenigmo
12 Vojaĝo tra Eŭropo
13 Federico Gobbo prilaboras argumentkomputilon
14+15 Kultura Tago - Culturele Dag


# La nederlanda IJK-teamo anoncas artistojn:



La teamo ekanoncis artistojn la 23an de februaro per sia anonckanalo en Telegramo: https://t.me/IJKNL
Ĉiusemajnfine estos anonco pri plia artisto, ĝis la mezo de aprilo. La unua anoncita artisto estas **Jonny M**, la populara germana kantisto de regea muziko.
La tuta artistaro aperos ĉe: ijk2020.tejo.org/vespera-programo/

# Novaĵkanalo beneluksa:

En Telegram, mi kreis novan plurlingvan novaĵkanalon kun prilingvaj artikoloj.
La celgrupo estas precipe beneluksaj esperantistoj, vi do.
Por aliri la kanalon, vi ne devas registriĝi en Telegram. Jen publika ligilo:
https://t.me/s/benelukso - ĝi aperas ankaŭ en www.benelukso.eu

Novaĵkanalo Beneluksa
@benelukso

Se vi volas per la novaĵkanalo disvastigi gazetaran artikolon kiu iel rilatas al Esperanto, sendu ĝin al mi kaj mi plusendos al la kanalo.
Se vi scivolas pri Telegram, venu al mia prelego pri tiu temo en Antverpeno la 13an de marto.
Informoj: https://eventaservo.org/e/edd402
- **Yves Nevelsteen**

# Mallongaĵoj



## De la redaktoro: Sciencumado en Stokholmo

Antaŭ kelkaj semajnoj mi translokiĝis al Stokholmo por studi tie dum duonjaro. Ĝis nun la lecionoj estis bonaj kaj la samklasanoj afablaj, sed gravas ankaŭ la vivo ekster la universitato. Unu el la unuaj aferoj, kiujn mi faris por esplori la urbon esti vizito al la naturhistoria muzeo, kiu tute plenis je interesaj biologiaj kaj mineralaj vidindaĵoj. La tuta rakonto legeblas sur mia blogo per la sekva retadreso:

*https://scivolemo.wordpress.com/2020/01/29/mi-vizitis-la-naturhistorian-muzeon/*

Teksto kaj bildo: Frank van Hertrooij



## Koncerto de Pjotr De Mulder



La 23an de majo 2020 okazos la jarkunveno de Esperanto Nederland en la salono Kargadoor en Utrecht.

Post la kunveno kaj manĝado de propra kunportata lunĉo koncertos por ni Pjotr De Mulder el Anverpeno.
Li estas profesia muzikisto. Li ludas klasikan gitaron. Plurfoje li prezentis sian programon, i.a. dum la Beneluksa Kongreso en Charleroi (2019).
Ĉiuj estas bonvenaj por ĉeesti tiun ĉi unuhoran koncerton!



## Ni ricevis korespondpeton


Karaj gesinjoroj!

Mia nomo estas Arkadio. Mi havas 50 jarojn. Mi loĝas en la urbo Novosibirsk (Rusio). Mi lernas Esperanton jam pli ol ses monatojn. Mi maltrafas la praktikadon de la lingvo. Tial mi tre volas trovi korespondantojn en Nederlando. Mi tre volas skribi leterojn al ili kaj komuniki kun ili per Skype-o. Mi estus tre dankema, se vi helpus min trovi amikojn en via lando.

Sincere,
Arkadio

retpoŝto: neptun_rus@yahoo.com

# Eduard Douwes Dekker naskiĝis antaŭ 200 jaroj (*kromnomo* Multatuli)



Eduard Douwes Dekker naskiĝis la 2-an de marto 1820 en Amsterdamo. Kiam li havis 19 jarojn li iris al Nederlanda Hindio, la nuna Indonezio, kie li dum 17 jaroj okupis diversajn postenojn, ĝis en januaro 1857 okazis konflikto kun la kolonia registaro pri la misfaroj en la rezidejo Lebak (Javo). Li maldungiĝis.

Ekde 1859, denove en Nederlando, li ekuzis la kaŝnomon Multatuli (latine: mi multe suferis) kaj verkis sian plej gravan romanon Max Havelaar (1860) en Bruselo, kun pledoj pri sia reakcepto en la kolonia registaro kaj plibonigo de traktado de la indoneziaj indiĝenoj.

La romano havis efikon en la nederlanda socio, sed ne liveris la rezulton kiun li atendis: oni ne redungis lin, sed la verko estis aklamita kiel impona literaturaĵo: ĝi estis bunta muntaĵo de diversspecaj formoj.


Seniluziiĝinta restis al li nur la verkista profesio. Li estis bonega oratoro kaj vere revigligis la stagnantan nederlandan lingvon, tamen li ne ŝatis esti verkisto, ĉar al li ĝenis ke oni laŭdis lin pro lia lingvouzo, kaj preteriris al la enhavo.


Li mortis la 19-an de februaro 1887 kaj estis la unua nederlandano kiu estis kremaciita.

En Max Havelaar la rakonto Saidja kaj Adinda estas tre ŝatata; ĝi aperis en Esperanta traduko de Johan van der Hoek.
Temas pri la vilaĝa junulo Saidja kaj lia amata Adinda. Pro milita agado de la kolonia nederlanda armeo Adinda mortas post kio Saidja ekbatalas kontraŭ la armeo. Sed plej bela el tiu rakonto estas kiel la bubalo, kiun Saidja prizorgas, savas lin dum atako de tigro.

Ribela saĝo enhavas parabolojn, rakontojn, aforismojn de Multatuli esperantigitajn de Wouter Pilger.

Unu el tiuj aforsmoj: Ideo n-ro 523: Neniu verkisto estas sufiĉe saĝa por kompreni la stultecon de siaj legantoj.




**La libroj estas haveblaj en la Libroservo de UEA:**

https://katalogo.uea.org



Verkis: **Anneke Schouten-Buys**

# Tagordo por la 29-a ĝenerala kunveno

...de Esperanto Nederland, okazonta la 23an de majo de 10.30 h ĝis 13.15 h, en la Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht.

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn, se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

**Alveno** ekde 10.00 h.

**01 Malfermo** de la ĝenerala kunveno je 10.30 h.
Rememoro de la forpasintaj membroj.

**02. Fikso** de la tagordo kaj envenintaĵoj.

**03. Protokolo pri la 28a ĝenerala kunveno en 2019** (teksto en Fenikso 2019 nr.5/6)

**04. Agadraporto pri 2019**

**05. Financaj raportoj pri 2019**
5.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono.
5.2. Rezultkonto pri 2019 kun klarigoj
5.3. Bilanco je 31-12-2019 kun klarigoj

**06. Proponoj**
6.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2021. La estraro proponas ne sanĝi la kotizojn.
6.2. Buĝeto kaj Laborplano 2020
6.3. Buĝeto kaj Laborplano pri 2021
6.4. Ŝanĝoj en la Huishoudelijk Reglement
6.5. Priparolado kaj akcepto de Beleidsplan 2020 - 2025

**07. Elektoj**
7.1. **Estraro**
Said Baluĉi, prezidanto: demisias kaj estas ne reelektebla. Nova prezidanto estas serĉata. La aliaj estraranoj estas: Rob Moerbeek kaj Ineke Emmelkamp kiuj demisias en 2021; Andries Hovinga kaj Loes Demmendaal demisias en 2022.
7.2. **Kaskontrol-komisiono**
Por la jaro 2019 estas Rudi Koot, Jeannette Bosse kaj Simon Smits (rezervo). Jeannette Bosse kaj Simon Smits restas. Nova rezerva membro ŝercata.
7.3. **Arbitracia komisiono**
La membroj estas Anneke Schouten-Buijs (ĝis 2022), Johan Swenker (2017-2020) kaj Marc van Oostendorp (2017- 2020), kiuj ambaŭ estas reelektebla por nova tri-jara periodo.

**08. Informado pri diversaj temoj**
8.1. Lingva Festivalo Drongo okazos en la aŭtuno 2020 en la Radboud Universitato en Nijmegen. Esperanto Nederland havos budon.
8.2. Beneluksa Kongreso en Charleroi / Belgio (17 – 20 sept.2020)
8.3. Studsemajnfinoj. La 3a, 4a kaj 5a de julio 2020 kaj aŭtune
8.4. Internacia Junulara Kongreso ( 11 -18 julio 2020) en Someren

**09. Jubileantoj** Ni honoras la membrojn, kiuj festas sian 50-jaran membrecon. Mi mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio.

**10. Verloren van Themaat-premio.** La ĵurio anoncas la rezulton.

**11. Ronddemandado.**

**12. Fermo**

Verkis la 20an de februaro 2020: **Ineke Emmelkamp**, sekretario



# Ĉampano Esperanto




*"Ik heb een fles ĉampano Esperanto, ofwel Esperanto Champagne. Was van mijn opa die ooit lid (of zelfs bestuurder) was van de Nederlandse Esperantisten. Hij is overleden in de 60-er jaren. Uit zijn nalatenschap stamt de champagne, die misschien wel 80 jaar of nog ouder is.*
*Het etiket is helaas verloren gegaan, maar het halswikkel, met daarop 'Ĉampano Esperanto Garantiata Origino' met het Esperanto-logo erop. Ook de kurk met wikkel zitten er nog op. De drank is helemaal helder. Enfin... een schitterend object. Wie kan er iets over vertellen, of over mijn Esperanto-opa (A.J. Jansen, geboren 27-10-1891).*
*Hij was leraar Esperanto, samen met dhr. van Weerhorst. Ze woonden enkele straten van elkaar in Nijmegen. We denken dat Opa ook bestuurslid geweest is, maar weten dat niet zeker..."*

Leo Eijkhout, *l.eijkhout@chello.nl*

# UEA raportas: nova donacrekordo!



"En 2018 UEA registris grandiozan rezulton pri donacoj (https://uea.org/gk/799a1). Kun granda ĝojo la Asocio povas nun diri, ke ĝi denove rekordis!

Rimedoj pro donacoj en 2019 entute atingis la sumon de **14 855 EUR.**

Kvankam la sumo por 2018 estis de la historia vidpunkto elstara, la nova sumo por 2019 reprezentas alian rimarkindan kreskon: ĝi superis tiun de 2018 je 2320 EUR. La diferenco egalas al la averaĝo de la tutaj jaroj dum periodo de 18 jaroj: 2000-2017. Tio signifas, ke la Asocio sukcesis ne nur teni sian historian donacallogon de 2018, sed ankaŭ kreski je vere signifa ŝtupo en 2019, kio estas sendube kialo de granda ĝojo por nia tuta komunumo.

Parto el tiu atingo venas el iniciatoj kiel Societo Zamenhof kaj Alianco 365, inaŭgurita pasintjare en testa fazo. La jaro 2019 estis la dua de Martin Schäffer kiel Ĝenerala Direktoro de UEA, kaj speciale helpis al tiu rezulto lia konstanta laboro tiukampe, nome persone alparoli donacantojn kaj skribe kontakti niajn diversajn membrojn. Finfine tiun sukceson UEA ŝuldas al siaj multaj membroj, kiuj malavare donacas al la Asocio, inter ili membroj de la Komitato kaj Estraro de UEA.

Ĉiu donacinto aperis en la Oficiala Informilo de revuo Esperanto (se ili ne donacis anonime)."

**Fonto:** Gazetara Komuniko de UEA n-ro 850

# Waarom lid worden van Esperanto Nederland?

Beste leden van Esperanto Nederland,

Ik heb net weer het jaarverslag voor 2019 klaargemaakt. In 2019 hebben we 15 nieuwe leden kunnen verwelkomen. In 2020 proberen we ten minste hetzelfde aantal te halen!

Het valt me iedere keer op dat niet alle mensen die lid zijn van een plaatselijke club, bekend zijn bij Esperanto Nederland. Ook in de bijeenkomsten van Amsterdam zie ik regelmatig mensen die geen lid zijn. Natuurlijk staat het iedereen vrij om wel of geen lid te worden. Laat deze mensen onderstaande tekst eens lezen. Ze zien dan wat Esperanto Nederland allemaal regelt. Met meer leden kunnen we meer ondernemen!

De vereniging Esperanto Nederland heeft als doel in Nederland informatie te geven over de taal Esperanto en over het talenprobleem in de wereld.

## Esperanto Nederland

- zorgt voor goed en nieuw informatie-materiaal
- heeft een interessante website die toegankelijk is voor iedereen
- ondersteunt de unieke leerstoel Interlinguïstiek en Esperanto aan de Universiteit van Amsterdam
- informeert de leden via het ledenblad Fenikso, de website en facebook
- ondersteunt vele activiteiten van Esperantisten en plaatselijke Esperanto-clubs in Nederland
- organiseert 2x per jaar een Esperanto-studieweekend en zo nu en dan ook andere dagen, zoals bv de ‘Kultura Tago’ op zaterdag 28 maart 2020.

Zonder de vereniging Esperanto Nederland zouden veel van deze activiteiten niet plaatsvinden. Het bestuur en veel andere vrijwilligers verzetten veel werk.




Nieuwe leden kunnen het ‘Esperanto - Grammaticaboek met oefeningen’, geschreven door Roel Haveman en Arjen-Sjoerd de Vries, ontvangen. Er wordt alleen een bijdrage in de verzendkosten (€ 7,50) gevraagd.

Word daarom lid van Esperanto Nederland!
Vragen over het lidmaatschap? Mail dan naar:
membroj@esperanto- nederland.nl

De contributie bedraagt € 35 per jaar (huisgenoten betalen € 12,50). Leden van NEJ betalen € 15 (huisgenoten € 5).

Aanmelding als lid van Esperanto Nederland kan per post bij de: ledenadministratie, Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord. Of nog makkelijker: gebruik het webformulier om lid te worden.
https://esperanto-nederland.nl/ned/formulieren/lid.php

Contributies en (vrijwillige) bijdragen kunnen overgemaakt worden naar de Triodos Bank op rekeningnummer: NL10 TRIO 0786 8441 67 ten name van Esperanto Nederland te Capelle aan den IJssel

Ineke Emmelkamp, secretaris Esperanto Nederland



# 2-a Eŭropa Civitana Renkonto en Kassel, Germanio

EBB2020 17.–20.9.

La "Europa-Union Kassel" kaj "Pulse of Europe Kassel" invitas al la **2-a Eŭropa Civitana Renkonto (ECR, germane EBB) en Kassel** de la 17-a ĝis la 20-a septembro 2020 en Kassel, Germanio. Invitataj estas aparte ĉiuj homoj el la EU-membroŝtatoj.

Sekcio "Kleriĝo kaj Lingvoj" / Inform- kaj Lernateliero

**ESPERANTO KAJ EŬROPO**

*Ĉiu scipovu minimume du lingvojn, sian gepatran kaj Esperanton. La neŭtrala internacia lingvo Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj povas decide plifortigi la integriĝon kaj solidarecon de la eŭropanoj. Kontraste al ĉiuj etnaj lingvoj Esperanto estas komprenata je persona kaj politika niveloj de la civitanoj kiel la plej bona ebleco de komunikado kaj interkompreniĝo por reala transkultureco, demokratia dulingveco kaj ekologia konformeco.*

*La evento estu inform- kaj lernateliero por ĉi lingvo. Ties kompetenteco, aplikebleco kaj aktuala aplikado estos prezentata el la kompreno de aktivaj esperantoparolantoj kaj el la vidpunkto de integriĝo en la lingvopolitikon de la Eŭropa Unio.*



**- Loko de la evento:** Salonoj de la Kulturinitiative Harleshausen (KIH), Kassel-Harleshausen, Karlshafener Strasse 2 (Ossenplatz)

**- Atingebleco:** Buslinio 10: de Hauptbahnhof, elirpunkto: Karlshafener Strasse iru ĉ. 250 m en kontraŭa direkto, 1-a strato dekstre

Buslinie 11 kaj 110: : de Bahnhof Wilhelmshöhe, elirpunkto: Karlshafener Strasse, kontraŭe de Ossenplatz

Ateliero, Modulo 1 - Ven., 18-an de Sept. 2020, 10:00 – 13:00

**M1.1. Pro kio disvastiĝas Esperanto?**

Aktualaj perspektivoj de la neŭtrala internacia lingvo

(Louis von Wunsch-Rolshoven, Germana Esperanto-Asocio, Berlin)

- Prelego kaj diskuto, ĉ. 2 horoj (germanlingva)

**M1.2. Esperanto – neŭtrala internacia lingvo kiel dua lingvo por ĉiuj**

- Kurta prezentado, filmo, ĉ. 1 horo (germanlingva, anglalingva, Esperantlingva)




Ateliero, Modulo 2 - Ven., 18-an de Sept. 2020, 14:30 – 18:00

**M2. Esperanto kaj la lingvopolitiko de la Eŭropa Unio**

(Ulrich Brandenburg, em. ambasadoro, Berlin)

- Prelego kaj diskuto (germanlingva)

Ateliero, Modulo 3 - Sa., 19-an de Sept. 2020, 10:00 – 13:00

**M3. Rekta ekspreslingvokurso ESPERANTO**

(Peter Kühnel, Ingenieur, Berlin)

- Lingvokurso sen la helpo de iu etna lingvo (Cseh-metodo). Oni dekomence parolas nur Esperanton.

**Kontaktoj:**

- koncerne de la ateliero kaj tranoktado ĉe samideanoj (1) kaj de la eventloko (2)
- (1) Wolfgang Günther (Esperanto-Rondo en la Kulturinitiative Harleshausen, Kassel)

Wilhelmshöher Weg 11, 34128 Kassel, (0)561 – 921 982 02, w.guenther.esperanto@web.de

- (2) Kulturinitiative Harleshausen e.V. – KIH (www.kih-kassel.de)

Karlshafener Strasse 2, 34128 Kassel, (0)561 – 88 71 60, kih-kassel@gmx.de

**Aliĝo:** - interrete: - workshop@kassel-ebb.eu (en la germana, angla ktp.)

- w.guenther.esperanto@web.de (Esperanto) – vd.supre Kontaktoj (1)



# Revuo-interŝanĝo de Alfonso Pijnacker

La verko de tiu ĉi artikoleto havas pliajn celojn. Unue mi volas veki intereson por (paperajn) revuojn por ke vi abonu. Abono estas ne nur aĉeto de revuo por vi mem sed samtempe kontribuo al nia movado. Por kreskigi la uzadon de Esperanto necesas leteroj, revuoj, libroj, kaj por produkti tiujn ni bezonas verkantojn kaj eldonantojn. Do, sen vi kresko ne estos. Memkompreble, la enhavo de la monujo rolas en decido pri abono kaj aĉeto. Nu, pro tio eble helpas interŝanĝo.

Se vi jam abone ricevas iun revuon vi povus interŝanĝi kun mi aŭ kun iu alia. Kaj, ankaŭ sen interŝanĝo, vi povus plezurigi iun alian, eble esperantiston en fora lando. Se vi interesiĝas nur pri speciala artikolo en revuo kiun mi priskribis, vi sendu peton al a.pijnacker@simpc.nl kaj vi ricevos la revuon.
En la lasta tempo mi ricevis jenajn revuojn, do mi povas oferi tiujn ĉi:

**1. Esperanto.En numero 1340-novembro 2019 jenaj artikoloj:** Instruista trejnado en Poznano-kiel plu?, Freŝa vento blovas en Kroatio, Esperanto dum POL'and'Rock, Nova vento venis en Koreion, Instituto Zamenhof en Togolando. En numero 1341-decembro 2019 jenaj artikoloj: Ludoviko Zaleski-Zamenhof, Unuiĝintaj Nacioj bezonas esperantistojn, Vivo kaj agado de esperantistoj en Indonezio, Volgia renkontiĝo en Samara. Plej grava estas eble la indekso per kio oni povas retrovi artikolojn el le tuta jaro. Altiris min la artikoleto “Alvoko al la enlernejaj Esperanto-instruantoj”. Mi ne komprenis kaj trovis en vortaro la vorton “abituro”, sed estas por mi klare ke absolute necesas E-instruado en lernejoj. Kaj tie ĉi mi volas pledi por varbi, pagi aŭ iumaniere subteni enlernejan instruadon.
**2. La Revuo Orienta.En numero 1168-oktobro 2019 jenaj artikoloj:** Mi kaj Esperanto de Lydia Lindla el Estonio, Piana ludo surstrata konsolas pasantojn. La cetero estas nur por japanlingvanoj.
**3. Nova Irlanda Esperantisto.En numero 154-2019/5 jenaj artikoloj:** Opero en Esperanto, AMO 59 kreis konkretajn rekomendojn, AMO-tri seminarioj-tri kontinentoj. Scio Sen Bariloj (SSB) okazigis SEminarion por Virinoj (SEVI). Tiu ĉi seminario okazis en Kotonuo (Benino) por kapabligo de virinoj en gvidaj roloj.
**4. La KancerKliniko.En numero 172-2019/4 jenaj artikoloj:** 10 paĝa tradukaĵo “Ĉu ni iomete parolu?” de Laŭrenco Septier, Taglibraj hajkoj de vojaĝo al Usono de Russ William, Bonan Tagon de Miron Radu Paraschivescu, tradukita de Ionel Onet. La filinoj de Lot', atributa al Alfred de Musset. Nu, kredi la rakonton pri Adamo kaj Eva, enhavas samtempe la akcepton de incesto. Tratempe la moralo ofte pro bezono aŭ depende de religio ŝanĝiĝas.
**5. Orientaj noveloj.Ĝi estas Krom-KancerKliniko, numero 34.** Malgrandlitera, 32 paĝa, A5 libreto, ne taŭga por vidhandikapulo. La noveloj estas tradukitaj el la franca kaj havas la titolojn: Kiel Vang-Fo saviĝis, La rideto de Marko, La lakto de la morto, La lasta amo de la princo Ĝingis, La viro, kiu amis la Neridinojn.
**6. Ĉiutaga vivo tra la mondo.**Ĝi ne estas revuo sed 240-paĝa, bela kaj interesa libro. La simpatia eks-UEA-estrarano HORI Jasuo el Japanio (mi iam go-ludis kun/kontraŭ li) kolektis rakontojn el la tuta mondo pri vivkutimoj kaj mem profesie eldonis. La rakontoj temas pri manĝaĵoj, vestaĵoj, domoj, dorlotbestoj, sortoj, lingvoj, sanigaj terapioj, hobioj, malnovaj rakontoj, festoj, religioj, konstitucio pri paco kaj milito kaj proverboj. La tekstoj de diversaj aŭtoroj estas pli-malpli facile legeblaj, ankaŭ por ne-spertuloj.Mi spertis ke multaj proverboj laŭvorte tradukeblas aŭ estas tuj kompreneblaj. Pensu al: Tempo estas mono. Pli bone malfrue ol neniam. La silento estas oro. La amo estas blinda. Ŝajno trompas.
**Nu, fine.**
Ni ĉiuj atentu la Post.NL- transportservon, ne nur pro la prez-plialtiĝo sed ankaŭ pri la reguloj rilate la paketoj al eksterlando.

# vortserĉenigmo

Solvu ĉi tiun akvan enigmon per forstrekado de ĉiuj vortoj el la listo sube. La restontaj literoj kune formos frazon.

| | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| O | Ĉ | I | O | U | L | I | M | O | N | A | D | O | J | B |
| T | I | R | L | E | Ŝ | D | O | T | K | E | S | N | I | E |
| N | A | L | E | B | K | A | V | A | T | O | M | U | L | O |
| I | J | O | N | P | I | V | F | E | B | A | S | E | R | Ĉ |
| C | A | P | I | A | S | K | I | I | K | E | U | O | V | O |
| A | O | Ŭ | C | P | F | R | S | N | D | I | L | L | Z | B |
| I | N | A | K | I | V | O | H | A | O | O | Ĝ | O | B | R |
| H | E | R | O | L | E | K | L | E | N | K | F | I | J | A |
| B | L | E | K | I | R | U | A | I | R | R | S | L | N | V |
| T | O | A | J | O | D | S | N | M | O | B | B | O | A | F |
| U | P | S | U | N | A | O | O | M | O | J | O | R | R | A |
| L | J | O | D | R | I | B | A | T | O | R | M | K | C | N |
| I | A | F | R | U | K | T | O | J | S | A | A | O | I | D |
| P | V | I | V | I | E | S | T | O | O | E | N | V | S | I |
| O | E | T | O | M | J | F | L | O | R | O | N | I | O | N |


Abeloj
Arbo
Aroma
Bela
Birdoj
Blua
Ekvinokso
Fandi
Floro
Folioj
Fruktoj
Herbo

Hiacinto
Insekto
Kokcinelo
Kovi
Krokuso
Limonado
Lumo
Metamorfozo
Narciso
Naski
Nesto
Ovo

Papilio
Poleno
Raŭpo
Roso
Suna
Ŝafido
Tulipo
Varma
Vekiĝi
Verda
Vivi

**Solvo de la lasta vortserĉenigmo:**

La orfiŝo ne iĝu glacikubo



# Vojaĝo tra Eŭropo

Esperantisto el Italio kontaktas Esperantistojn el Eŭropaj landoj por organizi internacian vojaĝon. Jen parto de la originala mesaĝo:

*Saluton geamikoj,*
*Mi planas vojaĝon tra la Eûropaj landoj (EU). Mi ŝatus pasigi po du tagoj en ĉiu ĉefurbo, pli-malpli. Mi ŝatus renkonti la lokajn Esperantistojn. La celo de tiu vojaĝo estas filmi ĉion, kio okazas, babiladojn, lokajn manĝaĵojn, monumentojn, ktp. Je la fino ni kreos filmeton kaj sendos ĝin al televidprogramoj kies temo estas vojaĝoj. Se ni sukcesos, se la filmeton oni montros en taûgaj programoj, certe la reklamo pri Esperanto estos grandega. Tro ofte en la televidprogramoj oni parolas pri Esperanto malbone, (almenaû en la itala televido). Ni devas respondi sen kvereli, nur montrante ke Esperanto ekzistas (ne estas mortinta lingvo), ke ĝi estas parolata ankaû de junuloj ktp... Ni devas prezenti Esperanton amuzmaniere. Mi serĉas kunvojaĝantojn. Mi intencas vojaĝi trajne aû fleksibuse. Mi petas helpon de vi por:*
*- Trovi malmultekostajn tranoktadojn.*
*- Organizado de renkontiĝoj, eĉ nur trinkado en iu trinkejo.*
*- Konsiloj por manĝi lokajn manĝaĵojn (malmutekostajn kompreneble).*
*- Akompanado tra la urbo por viziti la plej gravajn monumentojn ktp.*

*La vojaĝo en septembro-oktobro 2020 tuŝos 14 landojn: Kroation, Slovenion, Aûstrion, Slovakion, Ĉeĥion, Germanion, Nederlandon, Belgion, Luksemburgon, Francion, Brition, Irlandon, Hispanion, Portugalion, kaj Italion. Ĝis nun respondis al la alvoko nur Kroatio, Hispanio, Britujo kaj Francio. Se tiu unua vojaĝo kaj filmeto sukcesos, ni planos vojaĝon tra la aliaj Eûropaj landoj por la venonta jaro. Vi povas kontakti min fejsbuke (Gian Esperantista Pfleger) aû retpoŝte gian.pfleger@gmail.com*

*Amike,*
*Ĝanantonio Pfleger*

Jam venis reagoj el Kroatio, Germanio, Belgio, Francio, Britujo, Hispanujo, Nederlando kaj kompreneble Italio. Ĝis nun ni ja estas tri kunvojaĝantoj: Ĝanantonio kaj du virinoj el Francio kaj Kroatio. La ekzakta programo kun datoj kaj horaroj estos difinata, kiam oni havos ĉiujn kontaktojn.

# Federico Gobbo prilaboras argumentkomputilon



La 21an de februaro aperis artikolo en De Volkskrant, kiu menciis profesoron Federico Gobbo de la Universitato de Amsterdamo. Ni konas d-ron Gobbo ĉefe pro ties laboro pri Esperanto, kiun li pristudas kaj instruas en la universitato, sed la kampo en kiu li laboras estas pli larĝa ol tio. Kune kun liaj kolegoj, li provas konstrui komputilan programon, kiu povos spuri misrezonojn en argumentoj faritaj de homoj.

Hodiaŭ politikistoj kaj aktivuloj estas pli kaj pli intense kontrolataj de faktokontrolistoj, sed misrezonoj estas pli kompleksaj ol tio kaj foje malfacile troveblas. Ekzemplo de tia misrezono estus la sekva frazo: En la vintro homoj pli facile malsaniĝas kaj homoj surhavas varmajn vestaĵojn, do oni malsaniĝas pro varmaj vestaĵoj. Kompreneble tio ne estas vera, sed se oni ne scius pli bone, la argumento sonus ĝusta. Jam en la politiko de la antikva Grekio oni uzis tiajn misrezonojn konscie aŭ nekonscie kaj filozofoj kiel Aristoteles provis trovi ilin. Hodiaŭ, centoj de malsamaj misrezonoj estas konataj, sed oni ankoraŭ tuttempe uzas ilin. Eble komputilprogramo, kiu rekonas tiajn misrezonojn do povas esti utila ilo.

La programo, kiun la teamo konstruas nomiĝos Krino, laŭ la malnovgreka vorto por juĝi. Hodiaŭaj programoj povas rekoni vortojn kiel "ĉar", kiuj indikas rilatojn inter malsamaj frazpartoj, sed mankas bona kompreno de kiu rolo tiaj vortoj havas. Krino havu la malsamajn tipojn de argumentoj kiel bazon kaj uzu tiun bazon por scii ekzakte kiun rolon vortoj kiel "ĉar" havas en la argumento. Tiumaniere Krino povus helpi kun la interpretado de la strukturoj malantaŭ paroloj de politikistoj, dokumentoj de la juĝejo, aŭ sekurecajn normojn por fabrikistoj. Tamen, la tasko de Krino ne estas decidi ĉu iu teksto estas bona aŭ malbona. La uzanto mem juĝu, ĉu ri estas konvinkita.

Fonto: https://www.volkskrant.nl/wetenschap/deze-filosofen-maken-een-argumentatiemachine-die-hopen-zij-drogredenen-uit-toespraken-kan-vissen~b77a1a75/

Bildo: Aleks Andre
Teksto: Frank van Hertrooij



ESPERANTO NEDERLAND

# organizas:

# Kultura Tago

## Faktoj kaj Fantazioj

SABATO, LA **28A DE MARTO** 2020

Lastatempe, falsaj novaĵoj, intenca falsado de informoj kaj duonfantaziaj rakontoj altiras la atenton de multaj homoj. Oni avertas kontraŭ falsaj informoj, sed ĉu vi povus distingi falsan de vera informo? En via retpoŝta kesto jam malfacilas kelkfoje.. Kaj kio estas mito, kio estas fakto pri Esperanto? Ni festos la printempon kaj tio ne estas falsa novaĵo!

LIBROSERVO


dum la tuta tago Esperantistoj el Antverpeno prizorgas libroservon! Se vi deziras aĉeti specialan libron, sciigu tion al Korine (cheixaou@gmx.com). Ŝi zorgas ke FEL kunportos ĝin!



10.30 - 11.00 H AKCEPTO KAJ BONVENIGO

11.00 - 11.45 H PRELEGO DE DR. FEDERICO GOBBO PRI FANTASTAJ LINGVOJ


Fantazio estas grava afero, ankaŭ rilate al lingvoj. Ekzistas eĉ multaj fantastaj lingvoj kiuj kaptas la atenton de gejunuloj kaj gemaljunuloj. Oni povas nomi diversajn verkistojn kiuj elpensis sian propran fantastan lingvon. Ekz.e Tolkien. Estus interese aŭdi kial ili faris tiujn fantastajn lingvojn kaj ĉu ili havas vivon 'ekster la romano aŭ filmo'.



12.00 - 13.00 H LUNĈO

13.00 - 14.00 H KVIZO DE BERT DE WIT

Por testi vian kapablon distingi inter veraj kaj falsaj novaĵoj, inter faktoj kaj fantaziaĵoj, Bert de Wit prezentos kvizon pri "ĉu vere aŭ nevere?".



14.15 - 15.15 H PRELEGO DE ZIKO VAN DIJK "MITOJ PRI ESPERANTO"

Li parolos por pri faktoj kaj fantazioj en la Esperanto-mondo.

15.15 - 15.30 H PAŬZO

15.30 - 17.30 H KONCERTO DE KAJTO

Muzika parto por fini la kulturan tagon!




18.00 H BUFEDO

Nepre antaŭmendu.

**Loko:** Partycentrum Floor, Dorpsstraat 36, 6741 AL Lunteren
Facile atingebla per privata kaj publika transportiloj.
Promendistanco de la trajnstacio Lunteren estas 300 metroj.
**Aliĝi:** Anoncu vian partoprenon per la aliĝilo kaj indiku ĉu vi volas ankaŭ partopreni la vespermanĝon.
**Kotizo:** programo kaj lunĉo € 15,-- . Ne-membroj pagas € 18,50.
Bufedo, inkl. trinkaĵo : € 24,--
**Aliĝilo:**
https://esperanto-nederland.nl/cultuurdag/cultuurdag.php#2
aŭ per retpoŝto al sekretario@esperanto-nederland.nl

ESPERANTO NEDERLAND

**organiseert:**

# Culturele Dag

## *Feiten en Fantasie*

ZATERDAG, 28 MAART 2020


De laatste tijd is er veel aandacht voor vals nieuws, doelbewuste vervalsing van informatie en halffantasieachtige verhalen. Er wordt veel gewaarschuwd tegen valse informatie, maar kun jij valse onderscheiden van echte, werkelijke informatie? In je e-mailpostbus is het soms moeilijk om te zien. Wat is mythe, wat is een feit over Esperanto? Wij vieren het voorjaar en dat is geen vals nieuws!



BOEKENDIENST

Esperantisten uit Antwerpen verzorgen een boekendienst gedurende de hele dag. Als je graag een speciaal boek wilt hebben, laat het dan weten aan Korine (cheixaou@gmx.com), zij zorgt er dan voor dat FEL het boek meeneemt.

10.30 – 11.00 H ONTVANGST EN WELKOMSWOORD



11.00 – 11.45 H LEZING DOOR FEDERICO GOBBO OVER FANTASIETALEN.

Fantasie is belangrijk, ook met betrekking tot talen. Er bestaan zelfs veel 'aan de fantasie ontsproten' talen, die de aandacht trekken van jong en oud. Je kunt verschillende schrijvers noemen die een eigen fantasietaal hebben ontworpen, zoals bv. Tolkien. Het zou interessant zijn om de horen waarom zij deze fantasietalen hebben gemaakt en of deze ook leven buiten de roman of film.

12.00 – 13.00 H LUNCH



13.00 – 14.00 H QUIZ

Om je testen of je in staat bent om een onderscheid te maken tussen echte en valse nieuwtjes, tussen feiten en fantasie, presenteert Bert de Wit een kwis “ Waar of niet waar?“

14.15 – 15.15 H LEZING DOOR ZIKO VAN DIJK OVER "MYTHES OVER ESPERANTO"

15.15 – 15.30 H PAUZE

15.30 – 17.30 H CONCERT DOOR DE GROEP KAJTO

Een muzikale bijdrage aan het einde van deze dag.




18.00 H BUFFET

Wel van te voren bestellen.

**Loko:** Partycentrum Floor, Dorpsstraat 36, 6741 AL Lunteren
Facile atingebla per privata kaj publika transportiloj.
Promendistanco de la trajnstacio Lunteren estas 300 metroj.
**Aliĝi:** Anoncu vian partoprenon per la aliĝilo kaj indiku ĉu vi volas ankaŭ partopreni la vespermanĝon.
**Kotizo:** programo kaj lunĉo € 15,-- . Ne-membroj pagas € 18,50.
Bufedo, inkl. trinkaĵo : € 24,--
**Aliĝilo:**
https://esperanto-nederland.nl/cultuurdag/cultuurdag.php#2
aŭ per retpoŝto al sekretario@esperanto-nederland.nl

# Fenikso

24a jarkolekto, n-ro 1

januaro-februaro 2020


## Jarkunveno 2020



**Karaj membroj de Esperanto Nederland**

Al tiuj membroj kies retpoŝtoj jam konatas ĉe Esperanto Nederland, la estraro sendos la dokumentojn pri la jarkunveno de 23/5/2020 al viaj retpoŝtadresoj sufiĉe frue antaŭ la okazo de la jarkunveno.

Tiuj membroj kiuj ne uzas retpoŝton kaj volas ricevi tiujn dokumentojn papere, bonvolu peti la paperojn de la sekretario sed ekde 31/3/2020. Ŝian adreson vi trovas en la kolofono.

**Temas pri:**

1- Tagordo de la jarkunveno
2- Agadraporto
3- Wijzigingen in het huishoudelijk reglement
4- Beleidsplan
5- Financaj raportoj
6- Eventuale alia(j) dokumento(j)

**Alvoko por nova prezidanto**

Ĉar en la jarkunveno de 23/5/2020 la nuna prezidanto, Said Baluĉi, ne plu kandidatiĝos ni serĉas kandidaton por tiu posteno. La enoficiĝo komenciĝos post la jarkunveno.

La interesatoj bonvolu anonci sin al la sekretario:

**Retpoŝte:** sekretario@esperanto-nederland.nl

**Paperletere:** Vidu la adreson en la kolofono.

Eventueel retouradres: Esperanto Nederland Ledenadministratie, Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord